

Rakontoj de Liĉjo

Tria Volumo



Vi rajtas adapti kaj redakti la jenajn rakontojn laŭplaĉe. Simple aldonu la atribumon "Originale Verkita de Liĉjo MILLER".

You may adapt and edit the following stories however you wish. Simply add the credit "Originale Verkita de Liĉjo MILLER".

Enhavo

<u>Paĝo</u>	<u>Rakonto</u>
3	Paŭlo
4	Vizaĝo de la Amato
5	Margareto
6	Heleno la Policano
7	Hundoj
8	La Knabo kaj la Ursido
9	Mistera Libro
10	Ĉapelo
11	Stenografio
12	Ora Ringo
13	Martelo
14	Katrino kaj Henriko
15	Mia Poeto-Amiko
16	La Ĝardeno
17	Ĝemeloj
18	La Pakajo
19	Kompatinda Petro
20	Marinja
21	Monstroj kaj Anĝeloj
22	Malesperanto
23	Infaneto
24	Malbona Najbaro

Paŭlo

Paŭlo havis novan pantalonon, kaj novajn ŝuojn.

Kiam li iris al la lernejo, Panjo diris, “Paŭlo, zorgu pri viaj pantalono kaj ŝuoj! Ili estas tute novaj!”

“Jes, Panjo, kompreneble” diris Paŭlo.

Sed kiel okazas, kiam venis la paŭzo en la leciono kaj la infanoj eliris por ludi, ili ludis tre, tre malzorge.

Post alveno hejme, Paŭlo ĉirkaŭrigardis, ne vidis Panjon, kaj komencis silente paŝi al sia ĉambro. Li ne havis bonan planon pri la ŝirita pantalono, aŭ la koto-kovritaj ŝuoj.

Sed li ne bezonis tian planon, ĉar kiam li iris en sian ĉambron, Panjo estis tie, ordigante kelkajn aferojn.

La ceteron de la rakonto vi verŝajne jam komprenas.

Vizaĝo de la Amato

Kiam ŝi unue rimarkis lin, por ŝi temis pri “amo je ekvido”. Li estis tiel belaspekta. Klare vundita, iom fragila, sed tamen tre fortika kaj memstara.

Li, tamen, ne rimarkis ŝin, kaj eĉ kiam ŝi promenis proksimen ŝi ne altiris intereson aŭ reagon. Li rigardis aliajn homojn, sed ne ŝin.

Ŝi hezitis alparoli lin. Ŝi ne volis agi stulte, aŭ fari ion ajn netaŭgan. Kaj ŝi ial ne volis ke la amikoj aŭ familio konsciis pri ŝia amo. Temis pri privata afero.

Ŝi provis ĉiun tagon, per belaj vestaĵoj, per alloga mieno, sed vane.

Iun tagon, tamen, ŝi iris al la loko, stumblis, kaj falis. Ŝi koliziis kun li, frapis la kapon kontraŭ lia brusto, kaj kolapsis ĉe liaj piedoj. Kaj tra nigra vualo rigardis la marmoran vizaĝon de la amato.

Margareto

Margareto vizitis okul-kuraciston, kaj ricevis novajn okulvitrojn.

“Ho, mi nun vidas tiel klare!” ŝi diris. “Mi estas tre kontenta!”

Ŝi eliris el la oficejo, kaj vidis sian aŭton.

“Ho, ĝi ne estas tiel bela, kiel mi pensis!” ŝi diris. Ŝi iris al la aŭto-vendejo, kaj aĉetis novan, belan, brile verdan aŭton. “Mi estas tre kontenta!” ŝi diris.

Hejme, ŝi rigardis la murojn, kaj diris “Ho ve, ili estas malpuraj kaj makulitaj!” Kaj ŝi vokis farbiston, kiu farbis ĉion. “Kiel bele!” ŝi diris. “Mi estas tre kontenta!”

Sed vespere ŝi komencis spekti televidon, kaj konsciis ke la bildo sur la ekrano ne estas bona. La sekvan tagon ŝi mendis novan, grandan televidilon. “Ĉio estas tre klara kaj bona!” ŝi diris. “Mi estas tre kontenta.”

La sekvan tagon ŝia edzo revenis de vojaĝo pro sia laboro. Kiam li envenis, ŝi rigardis lin kaj pensis “Ho, li ne estas tiel bela . . . “

Heleno la Policano

Heleno estis la sola policano en la urbeto. Ĝi estis trankvila loko, kie nenio okazis, kutime. Almenaŭ nenio interesa.

Sed iun tagon, ulo prirabis la bankon, kaj foriris aŭte kun multege da mono. Oni vokis Helenon, kiu ĉasis la krimulon, laŭ kamparaj vojoj.

Ŝi rapide atingis lin, kun sireno kaj lumoj. Li flankeniris, lasis la aŭton, kaj komencis forkuri. Sed li ne atentis, kaj estis frapita kaj mortigita de kamiono.

Mistere, en la aŭto estis neniom da mono.

Kaj nun Heleno vivas bele sur tropika kariba insulo.

Hundoj

Iam estis tri hundoj, kiuj estis bonaj amikoj.

Ili nomiĝis Komenco, Mezo, kaj Fino.

Mezo estis gvid-hundo, kaj ĉiam promenis ĉe la komenco de la vico. Komenco estis gard-hundo, kaj ĉiam gardostaris ĉe la fino de la vico. Kaj Fino tre ŝatis esti en la mezo.

Iun tagon, ili vidis vendiston de kolbasoj. Kiel la hundoj, la kolbasoj estis en bela vico. Ili haltis, kaj petis kolbason de la vendisto. Sed Mezo kaj Komenco estis tre ekscititaj kaj malbonkonduktaj, kaj ricevis nur etan pecon.

Fino tamen staris pacience kaj bone atendis sian vicon, kaj ricevis tutan kolbason. Li manĝis ĉion, kaj ĝi estis tre bona.

Ĉar Fino bona, ĉio bona. *

[* Proverbo de Zamenhof: n-ro 595, "Fino bona, ĉio bona"]

La Knabo kaj la Ursido

La familio loĝis iom ekster la vilaĝo, proksime al La Arbaro.

“Ne iru en La Arbaron!” ĉiam diris Panjo kaj Paĉjo. “Tie estas ursoj.”

Kaj la fileto Nikolao ĉiam obeis.

Nu . . . “ĉiam”.

Venis tago kiam li vere enuis hejme, kaj Panjo kaj Paĉjo estis okupitaj ĉe sia komputilo. Kaj li gaje ekmarŝis en La Arbaron.

Preskaŭ tuj li renkontis . . . ursidon!

“Miaj Panjo kaj Paĉjo ĉiam diris, ne iru en La Arbaron, ĉar tie estas ursoj!”

“Miaj Panjo kaj Paĉjo ĉiam diris, ne iru en La Vilaĝon, ĉar tie estas homoj!”

ili kriis precize samtempe.

Ili rigardis unu la alian, ĉirkaŭrigardis por esti certaj ke neniu alia ĉeestas, kaj komencis ludi, postkuri, ĉasi, ĵeti herbon en la aeron, fari strangajn bruojn, kaj esplori sub ŝtonoj.

Multajn jarojn poste, estis rakontoj en la regiono pri ĝojplena viro kiu foje, en la lunlumo, dancis kun granda urso.

Mistera Libro

Mi preterpasis libro-bretaron en nia salono, kaj hazarde rimarkis nekonatan libron sur unu breto.

Ĝi estis bele bindita, kaj aspektis tre lukse.

Mi prenis ĝin, malfermis ĝin, kaj sur la titol-paĝo estis

Mrg Krnms

Blhf flrmf Dfzkrlm

Flrm drng bz

Nrngngk hrmf

“Ho, mistere!” mi pensis. Sed mi estis okupata, kaj remetis ĝin sur la breton.

Post iom da tempo mi rigardis la libron denove, kaj el ĝi falis eta slipo, sur kiu estis skribita:

“Tiu ĉi libro estas mia. Ĝi estas grava. Tiel grava, ke mi devis trovi bonan kaŝlokon. Ĝi ne okupas multe da spaco sur via breto. Mi petas, ke vi konservu ĝin diligente. Mi revenos iun tagon por repreni ĝin. M.T.V.”

Ĝuste tiel. En tute bona Esperanto.

Mi remetis ĝin.

Kaj nun mi malbone dormas ĉiun nokton . . .

Ĉapelo

--Saluton, Henriko. Ĉu vi ŝatas mian ĉapelon?

--Ho, ne, tute ne.

--Kial ne?

--Ĝi estas multe tro granda.

--Dankon pro via opinio.

--Saluton, Mario. Ĉu plaĉas al vi mia ĉapelo?

--Ne, ne. Tute ne.

--Kial ne?

--Ĝi estas multe tro malgranda.

--Dankon pro via opinio.

--Saluton, Izabelo. Ĉu mia ĉapelo estas bela?

--Ne, laŭ mi.

--Kial ne?

--Ĝi estas tro forte blua.

--Dankon pro via opinio.

--Saluton, Ismaelo. Kion vi pensas pri mia ĉapelo?

--Ĝi ne taŭgas por vi.

--Kial ne?

--Ĝi ne estas sufiĉe blua.

--Dankon pro la informo.

--Saluton, kara edzo. Ĉu vi ne amas mian ĉapelon?

--Jes, kara. Absolute.

--Ĉu vere? Kial?

--Pro la kapo, sur kiu ĝi sidas.



Stenografio

Mi havis amikon, kiu estis tre fame konata instruisto de Esperanto.

Iun tagon, en leciono, li diris “Mi volas klarigi al vi la plej gravajn elementojn de Esperanto. Se vi bone komprenos ilin, vi bone komprenos ĉion.”

Kaj subite li metis la manojn sur la bruston, enspiris, kaj falis mortinta sur la plankon.

Mi kaj kelkaj kolegoj kolektis liajn notojn kaj paperojn, kiujn li havis por la leciono. Sed montriĝis, ke ĉio estis skribita per iu nekonata sistemo de stenografio.

Mi longe serĉis iun, kiu povus deĉifri la materialon. Sed vane.

Tial mi nun restas en stato, ke mi ne bone komprenas ĉion.

Ora Ringo

Mi laboris en mia ĝardeno, kaj trovis en la tero oran ringon. En ĝi estis skribita “Adelberto al Grizeldo, 1929.”

Mi miris, ĉar mia propra nomo estas Adelberto, kvankam homoj nomas min “Bert.” Kaj mi ne konas iun, kiu nomiĝas Grizeldo. Kaj mi vivas en 2021, ne en 1929.

Mi montris ĝin al mia edzino, kaj ni ambaŭ miris.

Mi pluesploris en la ĝardeno, en la sama loko, kaj malkovris metalan skatolon, en kiu estis letero.

“Kara estonta Mi,

Mia Grizeldo mortis. Ŝi ne mortis per natura morto, sed ŝi tamen ne mortigis sin mem kaj ankaŭ estis mortigita de neniu. Unu tagon, promenante apud la reloj de fervojo, ŝi falis sub la radojn de veturanta vagonaro kaj mortiĝis.

Mi estas tiel malfeliĉa sen ŝi. Sed mi esperas al pli feliĉa sorto iam en la estonteco.”

Mi povas konfirmi ke mi kaj mia edzino vivas feliĉe kaj kontente. Sed nun aperas tre strangaj demandoj pri la universo. Kaj mia edzino decidis ne plu veturi trajne al sia laborejo . . .

Martelo

-- Jakobo, mi iros hodiaŭ al la butiko. Ĉu vi bezonas ion?

--Ho, jes, Elizabeto. Dankon! Mi bezonas martelon.

--Ĉu? Vi jam havas tiom da iloj. Ĉu vi ne havas martelon?

--Mi havis martelon, sed mi perdis ĝin.

--Mirinde. Vi preskaŭ neniam perdas aferojn. Kiel tio okazis?

--Mi riparigis la ponteton, kaj akcidente lasis ĝin fali en la riveron.

--Bone. Mi aĉetos martelon. Kial vi bezonas martelon nun?

*--Se havus mi martelon,
martelus mi matene,
martelus mi vespere,
tra tuta la mond'.
martelus danĝeron,
martelus averton,
martelus mi pri amo
inter ĉiuj homfratoj
tra tuta la mond'.*

Katrino kaj Henriko

“Mi havas novan ludilon! Mi estas tre feliĉa!” diris Katrino.

Sed Henriko, la najbaro, ne estis feliĉa.

“Mi ne havas novan ludilon”, li diris. “Miaj gepatroj ne havas laboron.”

Katrino tre ŝatis Henrikon, kaj ne ŝatis, ke li ne havas novan ludilon.

Kaj ŝi pripensis la aferon.

Kiam ŝi tagmanĝis, ŝi rimarkis, ke Henriko ne manĝas. Do, ŝi petis al Panjo, ke ŝi pretigu duan sandviĉon. Tiun ŝi donis al Henriko, kiu formanĝis ĉiom.

Kaj ŝi pripensis la aferon.

Katrino kaj ŝiaj gepatroj iris al la granda vendejo en la urbo, por aĉeti plurajn aferojn.

“Ĉu vi volas, ke ni aĉetu por vi novan ludilon?” diris la gepatroj.

Kaj Katrino ekploris.

Mia Poeto-Amiko

Mi havis amikon, kiu taksis sin poeto. Ekzemple:

*“En la bela monato de Majo,
mia vivo estas plena je gajo.
Mi dancas meze de belaj floroj,
mi dancas meze de floraj gloroj.”*

Mi diris al mia amiko, “Eble vi plej saĝe ne rezignu pri via bona posteno kun salajro.” Sed . . .

Iun tagon, mi ricevis leteron:

*“Mi estas vokita al poezia vivo.
Mi verkos Esperante, dank’ al PIVo.
Mi stiras mian aŭton al la estonto fora,
Mi fuĝas de mia vivo tro preme labora.”*

De mia amiko mi aŭdis nenion dum monatoj. Eble dum jaroj. Mi ne bone memoras. Sed iun tagon mi ricevis leteron:

*“Vi ne kredos, amiko mia,
sed mia vivo-plano
fiaskis. Kial Evildea
sukcesas, kaj mi, sen pano
sidas en mizero
for de hom-komforto?
Tute sen espero,
cele nur al morto?”*

(PS. Sendu monon. Mi malsatas)”

Mi skribis ĉekon, kaj sendis ĝin.

La Ĝardeno

(Esperanta versio)

Anna ĉiam ŝatis labori en la ĝardeno. Kaj ĉi tiu mateno, kun bela sunlumo, freŝa brizo, kaj birdkantoj en la arboj, estis pli ol perfekta.

Aarono estis en la domo, kaj amuzis la infanojn. Ŝi vidis lin tra la fenestro, ridetis kaj mansvingis. Kaj daŭre prizorgis la bedon antaŭ l'aŭtuno.

Ŝi forigis trudherbojn ĉirkaŭ la aspidistroj, kaj metis la ŝovelilon en la teron, la belan, fekundan teron. Kaj tuj sentis ion molan, kaj nekutiman. Ĝi nek rezistis, nek cedis . . . sed certe ĝi estis nenormala.

“Strange!” ŝi pensis. “Kio povus esti tie?”

Ŝi forigis iom da tero, kaj poste fosis pli profunden. Kaj enspiris kaj sentis svenemon. Ĉar tie, en ŝia ĝardeno, sub kelkaj centimetroj da tero, estis sen ia ajn dubo...

(English version)

Anna always enjoyed working in the garden. And this particular Saturday morning, with the bright sunshine, cool breeze, and the songs of birds in the trees, was more than perfect.

Aaron was in the house, entertaining the children, and she was cleaning up the beds as Autumn weather drew near.

As she cleared weeds and debris around the aspidistra, she stuck her trowel into the lovely, fertile soil . . . and encountered something soft, and unexpected. Not yielding, not resisting. Just . . . different.

“How odd”, she thought. “I wonder what could be there.”

She dug a bit of soil away, then dug deeper, and then gasped and felt faint. Because there, in her garden, beneath a few inches of soil, was an unmistakable . . .

Ĝemeloj

Izabelo kaj Ĵeremio, ĝemeloj, amis ludi en la malantaŭa korto.

Tiun vesperon, ili vidis brile luman objekton en la ĉielo, tute nekutiman.

Ili haltis, gapis, miris, kaj finfine kuris en la domon por voki Paĉjon kaj Panjon. “Venu! Estas io en la ĉielo!”

Paĉjo kaj Panjo formetis la telefonojn kaj eliris kun la etuloj.

Ankaŭ Paĉjo kaj Panjo gapis kaj miris.

“Henriko, kio ĝi estas?” diris Panjo.

“Mi ne scias, Elizabeto.”

Sibla sono, lumega lumo . . .

La eroj de la frapita planedo disflugis en la kosmon.

La Pakaĵo

Juna viro postkuras sinjorinon en homplena urba strato.

Juna Viro: Sinjorino! Sinjorino!

Ŝi turnas sin, kaj rigardas.

Sinjorino: Kio? Kio okazas? Kiu vi estas?

JV: Mi estis en la placo, kaj rimarkis ke vi lasis fali tiun ĉi pakaĵon. Mi tuj prenis ĝin, kaj provis ĝisatingi vin por redoni ĝin al vi.

S (*kun mieno de granda surprizo*): Ho. Jes . . . prave . . . tio ja estas mia pakaĵo . . .

JV: La placo estas tiel homplena ĝuste nun. Mi pensis, ke por vi ne estus eble retrovi ĝin.

S: Vi pravas. Mi ne povus retrovi ĝin.

JV (*kvazaŭ atendanta dankon*): Do, jen ĝi. (*transdonas la pakaĵon*)

S (*per frosta voĉo*): Vi klare estas ĝentila junulo. Dankon pro la redono. Nun bonvolu foriri. Mi estas tre okupita hodiaŭ.

JV (*ŝokita pro la tono de la voĉo*): Ho, o keĵ, do, en ordo, ne dankinde . . .

La juna viro turnas sin kaj komencas forpaŝi. La sinjorino subite krias al li:

S: Juna viro!

JV (*rigardas ŝin de mallonga distanco*): Jes, Sinjorino?

S: Kuru for, kiel eble plej rapide. Kuru nun.

Lumbrilo kaj sono de eksplodo.

Kompatinda Petro

Kompatinda Petro. En la urbo, li estis ofta temo de konversacioj.

Li laboris ĉe la ŝtata bestĝardeno. Soleca viro, vidvo, kies domo staris flanke. Hejme li havis diversajn dombestojn, kelkajn kokojn, miniaturan azenon. Sed li ĉefe laboris en sia propra ĝardeno.

Oni taksis lin stranga, sen aparta kialo. Geknaboj evitis lin sur la stratoj, kaj li malofte aperis en la urbetaj vendejoj.

Kiam iun tagon li ne estis ĉe la laborejo, oni iris al la domo, kaj trovis lin mortinta. Sed en la ĝardeno oni trovis la kadavrojn de centoj da hundoj, katoj, ekzotaj bestoj, kaj . . .

Marinja

Marinja sidis sola kaj malgaja sur la sofo, plorante. Roĉjo definitive forlasis ŝin, sen eĉ lasta karesa vorto, kaj nun la apartamento estis morna kaj silenta, krom la plorsingultoj. Post jaroj de kuna vivado, nun ne plu.

Tamen, forlasita virino ne povas plori senfine, kaj abrupte ŝi ĉesis, kaj konsciis pri laco kaj malsato.

Ekstarante, ŝi pensis pri Roĉjo kaj lia bela, alloga vizaĝo. Kaj forviŝis larmojn de la okuloj.

Ŝi iris en la kuirejon, kaj prenis jam pretan manĝaĵon el la fridujo. Plej simple, tiel. Kaj antaŭ ol fermi la pordon ŝi karesis la belan, allogan vangon de Roĉjo.

Monstroj kaj Anĝeloj

Nokto. Silento. Mallumo. Eta Anabelo kuŝis en sia lito, maldorma kaj maltrankvila.

“Panjo, estis monstro ĉe la fenestro.”

“Ne, kara, ne estas monstroj. Nur anĝeloj.”

“Paĉjo, mi vidis ĝin denove.”

“Ho, kara, fermu la okulojn. Ni kaj la anĝeloj gardas vin.”

Mateno. Sunleviĝo. Lumo. Rompita fenestro, malplena lito . . .

Same en la dormoĉambro de Panjo kaj Paĉjo.

Oni neniam malkovris, kio okazis.

Sed en kaverno en la sovaĝejo la monstroj kaj anĝeloj bone manĝis. Kaj laŭte ŝercis pri la artifiko . . .

Malesperanto

Petro taksis sin fortika. La plej aldonita Esperantisto en sia lando.

“Petro, ne vojaĝu al la kongreso. Epidemio okazas en nia lando, kaj en la tuta mondo.”

Tamen li prifajfis kaj aĉetis trajnbileton.

“Petro, malmultaj homoj ĉeestos. Ili nuligas planojn. Restu hejme.”

Tamen li prifajfis kaj vojaĝis al la kongresa urbo.

Ĉe la trajnstacidomo, li rimarkis la mankon de homoj. Malfacile li trovis taksion al hotelo, kie li akiris ĉambron, sed kie ne estis aliaj servoj. Esperanto komencis fariĝi malesperanto.

Dum postaj jardekoj oni rakontis pri trovo de kadavro, kiu fariĝis tute verda en hotela lito.

Infaneto

Sur la razeno, sub la arbo, kuŝis infaneto en blanka kitelo. Mi alkuris. Viva, sed senkonscia. Nenia videbla vundo. Ĉirkaŭe estis neniu homo aŭ aŭto. Nur malplena strato.

Mi prenis la telefonon por voki la sukuristojn kaj policon. Subite estis obtuza sono, kaj iom for falis dua infaneto, ŝajne el la ĉielo. Same vestita. Kaj tria. Kaj kvara.

Paniko min trafis. Mi ekstaris, kaj komencis paŝi retroen. Ĉe mia dorso mi tuŝis ion grandan kaj molan. Mi sentis svenemon, vomemon, kolapson. Fortan kapturniĝon. Mi fermis la okulojn, kaj falis.

Iom for falis el la ĉielo kvina infaneto en blanka kitelo.

Malbona Najbaro

Anna Crowley ne estis feliĉa. Jam dum pluraj semajnoj ŝi ne estis feliĉa, sed nur hodiaŭ ŝi komencis pensi pri murdo.

Ŝi havis bonan vivon, bonan laboron, kaj belan dometon. Ne estis edzo, kaj tia stato tute plaĉis al ŝi. En la domo estis nur ŝi kaj la du katoj, Miasmo kaj Mefito, kaj la triopo ĉiam kongruis.

Sed.

Bryan Fisher.

La najbaro, ĉe la orienta flanko.

Komprenu, ke Anna loĝis en la strato Cirklo Peffley jam multajn jarojn. La domon posedis ŝia patrino ĝis la morto, kaj poste Anna enloĝiĝis tute kontente. Ĉarma brika dometo kun ĉarma ĝardeno kaj ĉarma korto, brika barilo ĉirkaŭ la tereno kun ĉarmaj lignaj pordetoj kvazaŭ el infanrakontoj, kurtenoj el punto en la fenestroj, kaj ĉie ĉio estis pura kaj bonstata. Preskaŭ idilia vivo por virino kiel ŝi.

Ĝis la aĉeto de la najbara domo kaj la apero de Bryan Fisher.

Komprenu, ke Bryan estis vigla kaj aktiva viro, tre sportema. Li laŭte parolis, laŭte salutis la najbarojn, ofte kantis (en la domo, sed la fenestroj ne estis fermitaj) . . . kaj laŭ la kriterioj de Anna li ne estis aparte zorgema pri la domo aŭ korto, kaj ŝi taksis lin iom malpura. La ĝardeno malantaŭ lia domo superkreskis iom tro, ĉiam estis duonfinitaj “projektoj” (kiel ekzemple vitrodometo al kiu mankis vitro), kaj li ofte invitis amikojn al sia domo por festenoj kaj ludoj . . . kune kun iliaj bruo kaj ĥaoso.

Anna efektive toleris ĉion, malgaje, dum longa tempo. Ŝi restis en la domo kun Miasmo kaj Mefito, kroĉetis vespere, legis bonajn romanojn, eĉ foje verkis poemojn. Ŝi estis plenkreskulo, kaj komprenis ke ne ĉiu najbaro estas bona najbaro.

Ĝis la tago kiam la poŝtisto liveris al ŝi, akcidente, la poŝtaĵojn de Bryan Fisher.

Rapida trarigardo montris kaj konfirmis ĉion. Li estas adepto de la lingvo Esperanto. Ŝajne li estas eĉ Prezidanto de ia loka grupo de homoj kiuj same estas adeptoj. Estis du revuoj el fremdaj landoj, en nekonata lingvo. Strangaj poŝtmarkoj. Poŝtkartoj . . . VE!

Komunisto. Aŭ minimume socialisto. Kaj tio estis la lasta pajlero sur la dorso de la kamelo. Ŝi ekfrenezigis. “Kiel mi vivu tiel? Kial tia homo venus ĉi tien? Baldaŭ mi vidos homojn el fremdaj landoj sur la strato kaj en la apuda ĝardeno! Ne estas eble!” Kaj tiajn pensojn ŝi ne povis forigi, tage aŭ nokte.

lun meznokton ŝi vekigis, kvazaŭ el vizio. Pro tio ke la patrino loĝis en la domo multajn jarojn, Anna sciis, sed iom forgesis, ke en la fora angulo de la korto estas malnova, neuzita puto, profunda, kaj sufiĉe danĝera, ke iam oni kovris ĝin per peza ligna krado, sur kiun oni metis tufon kaj herbaron. Ĝi estas komplete kaŝita, sub arboj kaj ĉirkaŭita de arbustoj. Ĝi estus perfekta loko por plibonigi la mondon per la forigo de Bryan Fisher.

La sekvan tagon, krepuske, ŝi iris en la angulon de la korto kaj esploris. Jes, tiel estas la loko de la malnova puto. Jes, la ligna krado kovrita de herbaro restas. Jes, neniuj povus konscii ke en tiu ĉi loko estas puto, sen antaŭscio pri ĝia ekzisto. Jes, estus tute eble fari planon.

Jen, kion ŝi elpensis: En vespero kiam Bryan Fisher umos malantaŭ la domo, mi levos la kovrilon de la puto, kaj apogigos ĝin kontraŭ la superstarantan kverkon. Mi sidos ĉe la rando, kaj komencos ekkrii ke mia kato falis en la puton. Mi ploregos. Kriĉos. Falos sur la teron. Petegos helpon de iu ajn proksime. Kaj Bryan Fisher, pro tio ke li estas tia homo, alkuros, provos helpi . . . simpla puŝo, falo, malapero en la profundo, kaj remeto de la ligna kovrilo. Fino bona, ĉio bona.

La ideon ŝi kovis kelkajn tagojn, ĝis ŝi ne plu povis toleri la situacion en Cirklo Peffley. Ŝi studis la horaron de Bryan Fisher, kaj havis bonan ideon pri la tago en kiu li estus en la ĝardeno, sola.

En tiu tago, ŝi iris en la korton kaj paŝis malrapide al la fora angulo. Iom malfacile ŝi levis la lignan kradon, al kiu fiksiĝis la tufoj kaj herbaro pro plurjara kreskado sur ĝi. Ŝi metis ĝin tiel ke ĝi kliniĝis kontraŭ la grandan, maljunan kverkon. Ŝi enrigardis la puton, kiu estas sufiĉe profunda ke ŝi ne povis vidi la akvon. Ŝi lasis fali ŝtoneton, kaj post kelkaj sekundoj aŭdis la “plop” kiam la akvon ĝi atingis. Bele.

Ŝi stariĝis, kaj rigardis al la najbara korto. Kiel ŝi supozis, jen Bryan Fisher, Komunisto-Socialisto, kiu nun okupiĝis pri ia nova projekto, la muntado de nova kradrostilo. Ne estis amikoj, nur li. Venis la ĝusta momento.

Anna profunde enspiris, sidiĝis ĉe la rando de la puto, kaj pretigis sin por la dramo.

Sed en tiu momento ŝi vidis ion ĉe la alia flanko de la korto. Miasmo kaj Mefito trovis kunikleton, kaj komencis ĉasi ĝin. Pli rapide oli ŝi kapablis kompreni, ili alkuris al ŝi, kaj la kunikleto, Miasmo, kaj Mefito preterkuris la randon de la puto kaj enfalis.

“NE!” ŝi provis diri, sed la voĉo estis nur raŭka. Ŝi saltis por kapti la du katojn antaŭ certa perejo, sed maltrafis, kaj mem plonĝis la kapon malsupren en la puton. Dum la falo ŝiaj fingroj hokece kaptis la randon de la kradovrilo, kaj ĝi klakfalis en la antaŭan lokon.

Estis sonoj “plop”, “plop”, “plop” kaj “plop” el ie profunde. Poste dum iom da tempo estis obtuzaj miaŭoj, kaj krietoj por helpo. Sed jam estis vespero, Bryan Fisher jam sukcese muntis la kradovrilon kaj bonvenigis la gastojn por la festeno, kaj poste el la korto de Anna estis nur silento.